

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Vi aŭdas la sepan prelegon pri tiu temo.

Henry Dunant skribis en la komenco de sia libro *Rememoro de Solferino* : « *Simpla turista, tute fremda al tiu granda milito, mi havis la maloftan privilegion, dank'al speciala cirkonstancaro, povi ĉeesti emociigajn scenojn, kiujn mi poste decidis priskribi. Mi rakontas nur miajn personajn impresojn.* » (Fino de la citaĵo).

Mi prezentos al vi kelkajn erojn el la detala priskribo de la lukto, kiu okupas la kvindek unuajn paĝojn de la libro.

« *Sur ĉiuj montetoj, altaĵoj, rokeĝoj okazas obstinegaj bataloj : mortintoj amasiĝas sur la suproj kaj en la ravinoj. Aŭstroj kaj aliancanoj tretas sin unuj la aliaj : sur kadavroj ili sin mortigas : buĉo per kalkanbatoj, kraniorompo aŭ tratanĉo per sabro aŭ bajoneto ; ne plu ekzistas batalfronto, ni troviĝas en buĉejo, kie luktas kruelaj bestoj furiozaj kaj ebriaj je sango ; eĉ la vunditoj sin defendas ĝis lasta ekstremo : kiu ne plu posedas armilon, kaptas sian kontraŭilon ĉe la gorĝo por lin ŝiri per la dentoj. Jen lukto, kiu fariĝas ankoraŭ pli terura pro la alveno de aroj da kavaliroj, kiuj preterpasas galope : ĉevaloj hufpremas mortintojn kaj mortantojn ; vundito sentas sian makzelon foriri, alia havas sian kapon tretita, tria, kiun oni estus povinta savi, ricevas truon en sian bruston. Ĉevalhenoj akompanas homblekojn, estas furiozaj kriaĉoj kaj doloraj aŭ senesperaj hurloj. La artilerio rapidas post la kavalerio. Ĝi malfermas al si vojon inter kadavroj kaj vunditoj, kiuj kuŝas mikse sur la grundo : cerboj ŝprucas, membroj rompiĝas kaj eriĝas, la tero sorbas sangon kaj la kamparo kovriĝas je eroj da homoj... » (Fino de la citaĵo).*

Nia ĝenevano dum sia tuta vivo konstante revivos tiujn terurajn dekkvin horojn. Civitano de eta kaj pacema urbeto, li ne estis kapabla konsideri pli favore unu el la soldataroj. La hazardo kondukis lin ĉe la mezo de la batalfronto, kaj li konstatas, ke ambaŭ soldataroj obeas al la sama mistika frenezo kaj montras la saman heroan kuraĝon. Kiel neŭtrala observanto li trovas, ke simila hombuĉado estas stranga rimedo por la solvo de la internaciaj problemoj. Li konstatas, ke la realo malsimilas la klasikajn priskribojn de similaj bataloj. Ni reaŭskultu lin :

« *Oni konstante aŭdas ambaŭflanke de la fronto la tamburistojn frapadi kaj la klarionistojn soni ŝarĝon.*

« *La gvardio kondukas kun noblega kuraĝo. Sturmsoldatoj, ĉasistoj kaj frontbatalantoj rivalas laŭ merito kaj aŭdaco. Zuavoj kun bajonetoj kuregas saltante kiel sovaĝbestoj eligante raŭkajn kriojn. La franca kavalerio impetas sur la aŭstran kavalerion, ularoj kaj husaroj sin traboras kaj disŝiras ; eĉ la ĉevaloj ekcitataj pro la ardo de la batalo partoprenas tiun furioziĝon: ili sin ĵetas sur malamikajn ĉevalojn, kiujn ili kolerege mordas dum iliaj rajdantoj sin sabras kaj trahakas.*

« *En la mezo de tiuj bataloj, ĉie kaj ĉiam renovigataj, oni aŭdas el la buŝoj de homoj apartenantaj al tiom da nacioj eliri blasfemojn kaj malbenojn. Estas, ke plej multaj el tiuj homoj estas devigataj fariĝi hommortigantoj je sia dudeka jaro! »*

Kun tiu diro de Henry Dunant ni ĉesos legi batalscenojn. Ni nun kun li vizitu la batalejon, kiam la kanonoj ĉesis sian pafadon.

« *En la silento de la nokto aŭdiĝas ĝemoj, sufokataj sopiroj angorplenaj kaj doloresprimaj kaj ŝirantaj voĉoj, kiuj vokas je helpo: neniam ni povos rediri la agoniojn de tiu abomena nokto! »* (Fino de la citaĵo).

Nun Henry Dunant priskribas la spektaklon, kiun lumigis la suno de la 25-a de julio 1859:

*« La batalejo ĉie estas kovrita de homaj kaj ĉevalaj kadavroj ; sur stratoj, fosoj, ravinoj, arbetoj, herbejoj estas disŝutitaj mortaj korpoj. La ĉirkaŭaĵo de Solferino estas kriblita de tiuj senvivaj korpoj. La kampoj difektiĝis, tritiko kaj maizo, heĝoj disfalis, fruktarbaroj ruiniĝis, kaj de loko al loko oni trovas sango-marĉojn. »* (Fino de la citaĵo).

Henry Dunant priskribas la suferon de la vunditoj. Pri tiu temo ni parolos dum la venonta prelego. Liaj rigardoj ankaŭ iras al la mortintaj soldatoj. Ni citu unu el liaj diroj :

*« Jen filo, idolo de liaj gepatroj, edukata kaj flegata dum longaj jaroj de amema patrino, kiu timis eĉ liajn plej etajn malsanetojn ; jen brila oficiro, trezoro familia, li lasis ĉe si edzinon kaj infanojn ; jen juna soldato, kiu por la militado devis forlasi fianĉinon kaj preskaŭ certe patrinon, fratinojn kaj maljunan patron ? jen li, kiu kuŝas en koto, en polvo, kaj banas en sia sango. Lia vira kaj bela vizaĝo estas nereconebla, sabro aŭ mitrajlo lin ne ŝparis : li suferas, li elspiras ; kaj lia korpo, objekto de tiom da vartoj, nigra, ŝvelanta, hida, estas ĵetota en apenaŭ fositan fosajon ; lin kovros nur kelkaj ŝovelplenoj da tero kaj kaŭstika kalko. La rabobirdoj respektos nek liajn piedojn, nek liajn manojn, kiuj eliras la molan grundon aŭ la taluson, kiuj oficas kiel tombo... »* (Fino de la citaĵo).

La alvoko de Henry Dunant, kiel vi konstatas per tiuj fragmentoj, kiujn mi ĵus legis al vi, restos aktuala ĝis kiam la homoj ekkonsideros la militon, ne nur kiel forigindan, sed kiel forigendan malsanon.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Se vi deziras aŭdi la sekvontajn prelegojn pri tiu ĉi temo, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-